


ISSN: 0827-3154

Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

2003/2

aŭtuno / vintro 2003

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the *Lumo*



LUMO

Lumon eldonas dufoje jare KEA, P.O. Bo 2159, Sidney, BC, Kanado V8L 3S6
<www.esperanto.ca/kea/>

Lumo ('light') is published twice yearly by the Canadian Esperanto Association

Lumo ('lumière') est la revue semestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

ENHAVO DE LA NUMERO

Novajoj de KEA	3
Estraraj novaĵoj	3
Raporto de la estiĝanta prezidanto	5
Ceramika libro en Esperanto	6
Raporto pri NOREK (septembro 2003)	6
Raporto pri Okemo (oktobro 2003)	7
Raporto pri Montreala Zamenhof-festo (decembro 2003)	9
Amaskomunikila agado impona	10
Aliĝilo por Komuna Kongreso (julio 2004)	11
Filatelistoj serĉataj	13
Recenzemuloj kaj libroj serĉataj	13
Realiĝanonco	13
Esperantomobilo: por Esperanto en Norda Ameriko!	14
Artikoloj	15
Kanadaj lingvo-kostoj Kanado (B. Arthur)	15
Mondaj proverboj pri akvo	15
Recenzo de Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado (B. Arthur)	17
Internaciaj novaĵoj	18
UN kaj multlingveco	18
Internacia Esperanto-Muzeo endanĝerigita	18
UEA agado (Espero)	19
Al lingva demokratio	20
La unua operdisko en Esperanto	21
Aboneblecoj	21
Solvo de la lasta krucvortenigmo (D. Reble)	22
Nova Krucvortenigmo (D. Reble)	22
Superzam	24

Kolumno de la redaktoro

Atentaj legantoj rimarkos tuj ke la revuo subite havas novan redaktoron. Vi legos en la subaj paĝoj pri la nova estraro de KEA, kaj ĝuste pro la enoficiĝo de la novaj estraranoj bezoniĝis nova redaktoro. Mi tre kontentas raporti al vi ke Bob Williamson el Halifakso, Nov-Skotio, redaktos Lumon ekde nun; kiel li indikas en la sinprezento sube, li jam havas redaktan sperton, ĉar dum multaj jaroj li respondecis pri *Inter Ni*, la gazeto de la halifaksa grupo (kiu tamen mondscale legiĝas). Sed necesas ke mi plenumu mian devon kaj faru kelkajn anoncojn en ĉi tiu kolumno, kiel kutimas. Mi gratulu Bruce Arthur (Grenfell, SK), kiu unue ĝuste solvis la krucvortenigmon pasintan, kaj ricevas \$20 premion; Justin Dessureault (Boisbriand, QC) ricevas konsolan premion (\$10).

Mi danku al Bruce Arthur pro la letero, kiun li sendis al mi antaŭ multaj monatoj. Li forte pledas ke oni enmetu en Lumon pli da informoj pri KEA; espereble ĉi tiu numero iom respondos al liaj petoj. Sed la redaktoro forte dependas de vi, legantoj kaj anoj de KEA:

Lumo ja estas via revuo, kaj ni forte deziras enmeti pli da kontribuajoj viaj - raportoj, recenzoj ktp. Estas iom absurde ke multajn erojn en la rubriko pri kanadaj novaĵoj mi ĉerpas de internaciaj fontoj: mi preferus ricevi la informojn senpere. Alia peto venis de nia vic-prezidanto, Normand Fleury, kiu deziras ke oni enmetu detalojn pri venontaj kongresoj. Estas vere, ke ĝenerale mi nur enmetas anoncojn pri naciaj aranĝoj, kiaj Okemo kaj NOREK, sed mi ja pretas publikigi aliajn detalojn. Aliflanke, abundas gazetoj, kiuj aperigas plenajn detalojn pri internaciaj aranĝoj, kaj mi ne volus pleniĝi ĉi tiun revuon per la samaj informoj. Se tiajn revuojn vi ne abonas, mi rekomendas ke vi kontrolu iujn retejojn, ekz. tiun nomitan „Esperantoland”:

<<http://www.esperantoland.org/renkontiĝoj/>> aŭ tiun de la franca nacia asocio <<http://perso.wanadoo.fr/esperanto/kalendar.htm>>. Mi ankaŭ kaptu la okazon danki al Anne Neave pro ŝia artikolo pri NOREK, kiun mi bedaŭrinde ne povis enmeti pro manko de spaco.

Notu ke, meze de ĉi tiu numero, troviĝos informoj pri la julia komuna kongreso de KEA kaj ELNA; aliĝilojn por KEA (ne forgesu realiĝi!) kaj por la kongreso oni presos aparte. Mi esperas ĉeesti ĉi tiun eventon kaj intencas okazigi tie renkontiĝon kun la legantoj de Lumo; estos plezuro renkonti la legantaron tie kaj diskuti pri manieroj plibonigi la revuon. Fine, kiel kutime, mi kore dankas al Steĉjo Norvell pro lia lerta kunlaboro pri kompostado kaj al David Yaki pro la elsendo de la revuo.

— Geoffrey Greatrex

Limdato por la venonta numero: 20a de junio 2004. Kontribuajojn bv. sendi al Bob Williamson, <bob.williamson@ns.sympatico.ca>, 329 Poplar Drive, Dartmouth, Nova Skotio, KANADO B2W 4K8.

Novaĵoj de KEA kaj Kanado

ESTRARAJ NOVAĴOJ

Ekde la 1a de januaro ekoficos kvin estraranoj de KEA. Ja vere, nur kvin: temas pri la minimumo postulata de la regularo de la asocio. Ni esperas ke aliaj membroj de la asocio konsideros la eblecon sin proponi por alektiĝi al la estraro, ĉar estas spaco por pluraj aliaj estraranoj. La kvin membroj de la estraro estas: Wally du Temple (BC), Normand Fleury (QC), Geoffrey Greatrex (ON), Ken Price (ON) kaj Bob Williamson (NS). Por ke vi konatiĝu kun la kvin estraranoj, mi aperigas ĉi tie kelkajn informojn pri ili.

Normand Fleury (vic-prezidanto): Mi eklernis Esperanton en 1979 en Angers, Francio. Dum la somero 1980 mi partoprenis la IJK en Rauma, Finnlando kaj la UK en Stokolmo, Svedio kaj vere entuziasmiĝis pri la eblecoj de E. Mi uzadis la Pasportan Servon en dudeko da landoj kaj partoprenis amason da E-eventoj. En 1982 kiam mi revenis al Kanado kun mia edzino (Zdravka Metz, kroatinino) ni transprenis la estradon de la landa oficejo de KEA en Montrealo kaj de la Libro-Servo ekde 1984. Kun grupo da esperantistoj el Kebekio ni starigis la provincan asocion „Esperanto-Societo Kebekia” kaj respondecis pri la organizado

de la IJK de TEJO en 1992 kaj de la Nordamerika Kongreso de Esperanto en 1998. Mi aktivis diversmaniere pri la movado ĉar mi kredas ke danke al E. ni povus havi pli bonan mondon. <esperanto@sympatico.ca>

Geoffrey Greatrex (prezidanto): En 1985-6 mi lernis la lingvon en mia lernejo en norda Anglio. Poste, konstatinte la utilecon de la lingvo, mi regule ĉeestis la kunvenojn de la grupo en Oksfordo, kie mi studis, kaj fondis studentan asocion. Mi helpis revivigi JEB (la junularan sekcion de la Esperanto Asocio de Britio) en 1988 kaj fariĝis ties prezidanto. Samtempe mi aktivis en EAB kaj eĉ elektiĝis prezidanto de ĝi en 1991 (ĝis 1993); mi denove prezidis ĝin inter 1997 kaj 1998. En la 90aj jaroj mi sufiĉe ofte ĉeestis kongresojn, ne nur ne Eŭropo, sed ankaŭ tiun de TEJO en Montrealo en 1992. En la Eŭropa Esperanto-Unio mi agis kiel sekretario de la komitato je la komenco (en 1992); poste (eble vi divenis jam) mi prezidantiĝis en 1995 (ĝis 1997, se mi bone memoras). Krom tiom da prezidado, mi laboras kiel profesoro pri antikva historio, pli precize pri romia kaj bizanca historio. Pro mia laboro mi iom vagis de unu loko al alia, almenaŭ ĝis nun: post miaj studoj en Oksfordo, mi enposteniĝis en Otavo kiel profesoro, sed (tiom mi sukcesis) post unu jaro devis reiri al Britio, kie mi laboris en Kardifo dum du jaroj. En 1998 mi revenis al Kanado, ricevinte postenon en Dalhousie universitato, Halifaxo. De tie mi revenis finfine al Otavo, mia naskiĝurbo, en 2001. Cetere, se vi intencas alskribi min pri io (eĉ se mi ne plu estas redaktoro), bv. noti ke mi denove transloĝiĝis. Nun mi troviĝas je 903-333 Chapel strato, Ottawa, Ontario, KANADO K1N 8Y8. <greatrex@uottawa.ca>

Ken Price (sekretario): Mi eklernis Esperanton en 1954 kiam mi estis ankoraŭ en la lernejo, en Anglujo. Kiam mi iris al universitato, en Bristol, mi aliĝis al mezgrada kurso de la Bristola Esperanto-Societo, kaj poste fariĝis „help-sekretario” de la societo. En 1957 mi transloĝiĝis al Toronto. En la Esperanto-klubo ĉi tie mi renkontis eŭropajn esperantistojn, kiuj ĵus enmigris. Ili ne povis bone paroli la anglan lingvon, do ni multe uzis Esperanton. Mi fariĝis sekretario de la Esperanto-klubo de Toronto. En 1958 dum kunveno de la klubo, pro iniciato de Dez Hackett, ni refondis la Kanadan Esperanto-Asocion, kiu estis malaperinta dum la dua mondmilto. Dum la sekvaj dudek jaroj mi havis diversajn postenojn en KEA - sekretario, kasisto, redaktoro de *Lumo*, kaj „estro” (kaj sola laboranto!) de ĝia libroservo.

Mi ĉeestis kelkajn KEA-kaj ELNA-kongresojn, kaj kelkajn universalajn kongresojn. Post emeritiĝo antaŭ kvar jaroj, mi denove havis tempon por regule ĉeesti lokajn klubkunvenojn, kutime kvinfoje monate, kaj ankaŭ kelkfoje regionajn renkontiĝojn en Vermonto kaj Brita Kolombio. Iomete pli da biografia informo troviĝas en mia retpaĝo ĉe: <<http://webhome.idirect.com/~sukceso>> (kie ankaŭ troviĝas retversioj de numeroj de *La Torontano* kiujn mi redaktis).

Ekster la Esperanto-movado, mi estis direktoro de kreditunio dum kvin jaroj, kaj ankoraŭ estas direktoro de komputila klubo, kaj de ses karitataj fondaĵoj rilate al subvenciataj loĝejoj por nepagipovaj familioj. Bedaŭrinde ili ne estas la speco de karitato kiu povas helpi la Esperanto-movadon! Ŝajnas ke kelkaj junaj Esperantistoj opinias ke nuntempe oni bezonas nur „la reton”, ke presaĵoj ne estas bezonataj, kaj „malnovstila” nacia organizaĵo ne multe utilas. Mi ne konsentas pri tio. Kiam la novaĵletero de mia loka klubo ĉesis aperi

post demisio de la antaŭa redaktoro, kaj iu komentis „nu, sufiĉas reta bulteno”, mi komencis mem redakti kaj presi novaĵleteron. Ni devas laŭeble uzi ĉiujn metodojn, malnovajn kaj „modernajn”, en niaj kluboj, kaj en KEA, por propagandi, por informi kaj teni la intereson de kaj novuloj kaj malnovaj membroj. La reto certe plifaciligas komunikadon inter la membroj kiuj uzas ĝin, sed la plej bona komunikado okazas kiam membroj renkontiĝas kaj persone ekkonas unu la alian. Regionaj renkontiĝoj bonege funkcias tiurilate. Landaj kongresoj estas tre valoraj por ebligi al la membroj interkonatiĝi, kaj interŝanĝi ideojn pli libere ol ili eble farus per retmesaĝoj.

Mi esperas ke *multaj* membroj, el *ĉiu* parto de Kanado, partoprenos la Kanadan Kongreson en julio 2004 en Sidney, kie ni povos diskuti ideojn pri kiel KEA povas plej agi por progresigi la movadon en Kanado. <ken.price@canada.com>

Wally Du Temple (kasisto) esperantiĝis en 1969 en Otavo. Li edziĝis al samideanino Olga Valentova el Ĉekio en 1972. Iliaj infanoj estas denaskaj geesperantistoj, filo kaj filino, Evan kaj Hana. Spaco mankas por detale klarigi ĉion pri la aktivecoj de Wally Du Temple kiel Esperantisto. Li fondis la Esperanto-klubon de Viktorio en 1970, estis redaktoro de Lumo por du oficperiodoj, prezidanto de KEA plufoje, funkciis kiel estro de la Libroservo kaj Informofako kiam ili troviĝis en Brita Kolombio inter 1976 kaj 1984, komitatano de UEA, kasisto de KEA por jardeko, organizanto de la Nordokcidenta Regiona Esperanto Konferenco dekkvinfoje, organizanto de kvar Kanadaj Kongresoj de Esperanto, kaj prezidanto de la Loka Kongresa Komitato de la 69-a UK en Vankuvero. <iwolemskat1@shaw.ca>

Bob Williamson (redaktoro de Lumo): Mi eklernis Esperanton dum la fruaj okdekaj jaroj post kiam mi aŭdis anonceton en radio pri senkosta perpoŝta kurso. Antaŭ ol mi finis ĝin, sub la gvidado de Kim Keeble, mi jam fariĝis grupano de halifaksa diskut-rondeto sub la gvidado de Harry Lewis. Mi ne multe aktivis kiel esperantisto, sed mi jam redaktadis nian ĉiumonatan gazeteton *Inter Ni* dum la plejparto de ĝiaj 17 jaroj. Nia legantaro malmultnombros tra la mondo. Mi ankaŭ jam deĵoris sen ofico en la estraro de KEA por reprezenti la esperantistaron de la marbordaj provincoj.

<bob.williamson@ns.sympatico.ca>

RAPORTO DE LA EKSIĜANTA PREZIDANTO

Karaj kolegoj, Nia redaktoro petis min skribi kelkajn vortojn ĉe la fino de mia oficperiodo. Ĝi fakte komenciĝis por mi tute neatendite post la subita demisio de nia antaŭa prezidanto. Estis interesa sperto, certe iom temporaba, legi ĉiutage amason da raportoj el plej foraj landoj pri tieaj sukcesoj kaj kunvenoj. Bedaŭrinde en Kanado ni ne povis konstati saman viglon nek kreskon de nia asocia anaro dum la lastaj jaroj. Mi eĉ eksuspektas, ke estas nun eble ankaŭ tiom da uzantoj de Esperanto en Kanado, kiom da kotizintoj al KEA. Ĉu ni povos iel ŝanĝi tion? (Kaj tra la tuta lando estas ankoraŭ nur ĉ. 66 abonantoj al nia tutlanda dissendolisto ĉe Jahu <esperanto-ca>, inter kiuj ankaŭ kelkaj ne-kanadanoj). Tio estas tre bedaŭrinda stato, ĉar tiu listo efektive montris sin esti nia plej efika kaj rapida maniero pludoni informojn, por ne paroli pri la ŝparataj poŝtaj elspezoj. Bonvole do aliĝu, se vi

ankoraŭ ne membras tie! Via estraro uzis apartan Jahu-liston, kiu bone funkciis, krom lastatempe iomete lametanta interkomunikado. (Inter lastatempe diskutitaj eroj estis: financa subteno al la kalgaria E-Centro; komuna KEA-ELNA-kongreso en 2004; subteno al la Ĝangalo.com TV-kampanjo?; planata nord-amerika Esperantomobilo; libroservo). Sen la granda informiteco de nia sekretario kaj la longa, preskaŭ prahistoria, memorkapablo de nia kasisto mia tasko estus multe pli malfacila, kaj mi aparte dankas ilin ambaŭ pro la daŭra subteno, kiel ankaŭ al la aliaj estraranoj - ĉiuj kompreneble volontuloj kun limigita disponebla tempo.

Kiel ĉiam, la plej granda problemo por nia Asocio estas nia dissemiteco tra la landego - en malmultaj lokoj troviĝas pli ol du/tri movade engaĝitoj en unu sama loko. Pro tio niaj regionaj kunvenoj, kiaj la orienta Okemo kaj la okcidenta NOREK, iĝis tre gravaj por ni, kaj ties organizintoj meritas ĉies laŭdon kaj dankon, kiel ankaŭ la fidelaj animantoj de niaj lokaj grupoj. (Mi pretere esperas povi baldaŭ legi oficialan raporton en *Lumo* pri la E-Centro en Kalgario). Ŝajnas, ke komputiloj funkcias jen malavantaĝe al la tradicia movado, malfermante la Esperantan mondon al ĉiu, sen la bezono membriĝi en ajna asocio; kaj jen avantaĝe, ĉar per ili oni sukcesas informi pli da eksteruloj pri nia lingvo. Ĉi tie brilas kelkaj el niaj lokaj retejoj - mi invitas vin, foje viziti ilin por vidi, kio estas nova! Ni devas lerni, kiel plej bone utiligi komputilojn je nia avatango. Restas al mi nur transdoni plej varmajn jarfinajn salutojn al ĉiuj kanadaj E-uzantoj, memorigante vin rekotizi kiom eble tiom baldaŭ, kaj dezirante al nia nova estraro fruktodonan kaj kunlaboran oficperiodon. Dankon al ĉiuj pro la kunlaboro!

—Amike salutas via, Brian Kaneen

Ceramika Libro En Esperanto:

Esperantlingva versio de la libro *Substitutions for raw ceramic materials*, titolita *Anstataŭaĵoj por keramikaj krudmaterialoj* eldoniĝis lastatempe. La verkinto, Edouard Bastarache, kebekiano, estas fakulo pri ceramikaĵoj.

RAPORTO PRI NOREK (EN SEPTEMBRO 2003)

La 22-jara tradicio de NOREK donis plurajn spertojn al la organizantoj. Unu el ili estas rekomendinda al tiuj, kiuj planas kelktagan renkontiĝon de la samideanaro: **la renkontiĝo havu temon**. Preferinde, tiu temo estu ĝenerale konata aŭ deklarita de iu renoma organizo. La organizantoj de NOREK ĉiam sekvas la temon elektitan de UNESCO, ĉar ĝi tiam estas multfaceta kaj aktuala.

La UNESCO (kaj NOREK) temo por la jaro 2003 estis "Freŝa akvo" kaj ĝi traktiĝis dum la plejmulto de la programeroj. Ĝi eĉ regis la interkonaon vesperon: dank' al la fakto ke ni (la E-klubo de Victoria) havas vere bonan gitar-ludanton, ni ĉiam - post brakumado kaj frandado - kantas. Kutime ni kantas laŭ proponoj kaj deziroj de la ĉeestantoj, sed ĉi-jare ni „vojaĝis tra Eŭropo kaj Norda Ameriko sur la ondoj de riveroj, riveretoj, lagoj..." Paĝoj de granda atlaso kaj TTT-paĝoj provizis nin per historiaj kaj geografiaj informoj pri la koncernaj akvaj objektoj kaj pri la cirkonstancoj, kiuj inspiris ekeston de la kantoj.

La du kanadaj E-kantlibroj (*Kantfesto* kaj *Kantu Kanade*) enhavas kelkajn priakvajn kantojn, sed ni aldonis kelkajn aliajn, kiuj bezonis aŭ novan aŭ korektitan tradukon. Nur mallonge antaŭ NOREK iu menciis, ke estus bone aldoni unu plian kanton, kiu estis iam ege populara kaj kiu ege taŭgas por freŝakva temo. Tiu anglalingva kanto havas la titolon *Cool Water*. Tamen, la traduko ŝajnis esti *nesuperebla defio*. Ĉu ni do forgesu pri la afero? Aŭ ĉu ni... interesigu la tutan ĉeestantaron kaj eble trovu inter ni geniulon, kiu kapablas traduki kvazaŭ senpene? - Jes, tio estus pli bona!

La „geniulo" estas Liland Ross, alinome Ros'Haruo, seatlano. Li prenis kun si la anglalingvan tekston en sian hotelĉambro, li „dormis" sur ĝi, kaj matene eniris la konferencejon kun la traduko enmane! Ni provkantis ĝin kaj opiniis ĝin perfekta. Nun vi juĝu:

FRIDA AKVO

(traduko de Ros'Haruo)

Tra l'tuta tag'
dezerta vag'
sen gut' aŭ flak'
da akvo malvarma.

Ĉe Dan kaj mi
gorĝ-agoni'
anima kri'
por akvo frida, klara.

Pluiradu, Dan,
lin ne aŭskultu, Dan,
li - ne homo sed satan'
-
kovras sablon per la
flam'
kaj akvo.

Jen verda pin!
Subfluas ĝin
en libero laŭ inklin'
kaj atendas tie min kaj
vin
frida klara akvo.

Dum friska nokt'
min trompas vok'
la stel-mensog'
pri akvo malvarma.
Sed kun aŭror'
mi post langvor' plu
paŝos for
ĝis akvo frida, klara.

Pluiradu, Dan....

Noto je konkludo: la provinco Brita Kolombio suferis dum la tuta somero 2003 pro manko de pluvo. La akvorezervujoj estis preskaŭ krize malplenaj, herbejoj estis brunaj kaj tute sekaj. Dum la NOREK priakva kantado iu menciis: „Eble tio allogos pluvon.." Kaj vere, postnelonge la unuaj nuboj aperis ĉe la horizonto, kaj vespere alvenis refreŝiga, densa pluvo. La moralo: oni neniam malestimu la povon de la Esperantistaro!

— Olga Du Temple

RAPORTO PRI OKEMO 2003 (en oktobro, 2003)

La aŭtuno estas mia plej ŝatata sezono. Al mi, la aŭtuno ĉiam signifas sangiĝon. Ekde kiam mi aĝis ses jarojn, nova lerneja jaro komenciĝis aŭtune. Pro tio, kaj malgraŭ tio ke mi ne plu ĉeestas la lernejon, aŭtuno estas ankoraŭ la komenco de la jaro por mi. Tre plaĉas al mi la freŝaj malvarmetaj tagoj, la arboj, la antaŭvespero de Ĉiuj Sanktuloj. Kaj mi scias ke kiam la arboj ekŝanĝiĝas, baldaŭ mi vojaĝos al Okemo.

Dum la pasintaj dek jaroj, la Internacia Semajnfino Esperantista (ISE) okazis en Ludlow, Vermonto ĉe la skiejo Okemo. Kvankam la renkontiĝo mem nomigas ISE, mi ĉiam nomas

ĝin "Okemo". Stranga esperanta vorto. Kiel oni emas pri ok?? Do, dum la kanada dankfesta semajnfino, kaj la usona Kolumbo-festo, esperantistoj kuniĝas por paroli, lerni kaj festi. Ĉi-jare, mi spertis mian kvaran Okemo-renkontiĝon.

De Otavo, ni aŭtis al Montrealo por renkonti la organizantojn de ISE, Normandon kaj Zdravkan. Min ĉiam ĝojigas vidi ilin. Mi eklernis Esperanton de mia edzo (tiam mia koramiko) antaŭ kelkaj jaroj en Novtero. Ne estis esperantistoj tie, do, post kiam mi translokiĝis al Otavo, Normando kaj Zdravka estis la unuaj esperantistoj kiujn mi renkontis.

Do, de Montrealo ni foriris frue sabatmatene. La vojaĝo al Okemo daŭris dum proksimume kvin horoj. La veturado estis tre glata. Ni transiris la landlimon inter Kanado kaj Usono senprobleme, kaj atingis Vermonton. Kia bela regiono! Verdaj montoj kaj valoj, kamparoj, belaj urbetoj. Ĉu Vermonto same belas dum la aliaj sezonoj? Ni alvenis en Ludlow posttagmeze. Post rapida manĝo kaj ordigo en la luita apartamento, ni iris al la rekontiĝejo. Estis belega tago, pli kiel somero ol aŭtuno. La junuloj de Montrealo iris eksteren por ludi svedan ludon „kubb” sur la herbaro kun mia edzo. Dum la ludo alvenis pli da homoj, novaj kaj jam konataj.

La unua programero estis la „Interkona Vespero” post la vespermanĝo. Per ludoj de Normando, mi ekkonis novajn amikojn. Dum la lasta ludo, ni ricevis liston de landoj. Normando ludis nacian himnon, kaj ni devis decidi de kiu lando ĝi estis. Diable! Kelkajn ni konis, sed aliaj... Post dek himnoj, mi ekfrustrigis. Post dudek, ili same sonis. Post tridek, mi ekpensis ke internacia lingvo kaj internacia himno eble estus bonega ideo. Unu el miaj plej ŝatataj partoj de la renkontigo okazis post kiam la tago finiĝis. En nia loĝejo, la junuloj kunvenis por babili, muzikumi, ludi kaj amuziĝi. Dum mi bakis kuketojn por la komuna mango de la venonta vespero, mi ĉirkaŭrigardis kaj sentis min feliĉa. Sen Esperanto mi neniam renkontus miajn amikojn de Kanado kaj Usono. Mi tute ne parolas la francan, do sen Esperanto mi eĉ ne povus paroli kun miaj amikoj de Montrealo.

Sabate, la baz- kaj meznivelaj kursoj daŭris. Estis ankaŭ prelegoj, filmo kaj Oratora Konkurso. La esperantistoj venis de diversaj regionoj, kaj havis tre diversajn interesojn. Ili parolis pri milito, sportoj, la Biblio, eĉ pri nenio! Inter la programeroj, ankaŭ estis tempo por teumi, babili, amuziĝi kaj aĉeti librojn, pinglojn, ktp. Mi tre ŝatas librojn, do mi iom freneziĝis kiam mi vidis la eblecojn. Dum la posttagmezo, estis nova programero. Kelkaj homoj iris al la naĝejo de la skiejo por naĝi kaj ludi. Ni ludis „Marko Polo”, „Ludoviko diras.” (mi ĉiam fuŝis dum tiu ludo) kaj diversajn ĉasludojn. Ni tre ĝuis la banadon, sed venis la horo por prepari por la komuna manĝo.

Dimanĉvespere ĉe Okemo estis mia plej ŝatata periodo. Ĉiuj preparis aŭ aĉetis manĝaĵojn por dividi. Estis pano, pastaĵo, suŝio, legomoj, fiŝaĵo, pico, salato, fromaĝo. Kaj poste estis kuko, kuketoj, glaciaĵo, ĉokolado. Komuna manĝo estas bona. Post la manĝado komenciĝis la vespera programo. Ĉi-jare, Normando kaj Zdravka organizis aŭkcion! Bona ideo! Kaj la mono helpas establi internacian esperantlingvan televidkanalon en la interreto (ITV). Bonega ideo! Mi ne sciis kiel, sed li havis sakojn de esperantaj kongresoj, pinglojn, orelingojn, monerojn, ĉemizojn (eĉ por kongreso kiu ne ankoraŭ okazis), kaj aliajn aferojn. Kelkfoje estis ofertmilitoj por la aĵoj.

Mi ĉiam miras pri la lerteco de esperantistoj. Ŝajnas al mi ke ĉiuj povis aŭ kanti, au ludi muzikilojn, aŭ rakonti ŝercojn. Ni junuloj planis improvizan skeĉon por la kultura vespero.

Ni staris antaŭ la ĉeestantoj kaj petis situacion kaj literon. Iu diris „gravedeco”, kaj la literon. La unua junulo komencis sian frazon per tiu litero, kaj la venonta homo komencis per la sekva litero, ktp. Vere estis amuze. Ni uzis la tutan alfabeton, kaj finis la situacion. La homaro tiom ĝuis ĝin, ke ili petis plian situacion. Improvizita skeĉo ja estis bona ideo; estis nek planado nek ekzerciĝo. Post la kultura vespero, ni reiris al la apartamento. Tie ni babilis, manĝetis kaj ludis ĝis post la noktomezo. Mi tre ĝuis la ludojn, sed mi sciis ke la semajnfino finiĝos morgau, kaj mi estis iom malgaja.

Do, venis la fino de la 10-a Okemo. De Vermonto, ni foriris al niaj propraj urboj. La renkontiĝo ĉe Okemo pliboniĝas ĉiujare. Ĉiam estas novaj farendaĵoj, ludoj, libroj, manĝaĵoj kaj amikoj. Mi ĉeestis la Universalan Kongreson, kaj la Internacian Junularan



Kongreson, kaj mi ege ĝuis la grandajn aferojn. Sed Okemo estas speciala por mi. Ĝi estis mia unua Esperanto-renkontigo. Tiam, mi ne bone komprenis nek parolis Esperanton. Sed kiam mi revenis, estis pli kaj pli facile komuniki kun la aliaj esperantistoj. Tre plaĉas al mi vidi la samajn amikojn. Mi povas aŭdi kiom pli bone ili parolas, kaj kiom grandaj la infanoj nun estas. Ĝi vere estas kiel familia kunveno, kun mia vasta, bela, esperanta familio.

— Karlena Daley

Maltradicia Decembra Festo

De jardekoj en Montrealo ni tradicie festas Zamenhofon meze de decembro. Sed pasintjare ni decidis organizi pli grandan eventon kiu koincidis kun la 20 jariĝo de la E-Societo Kebekia kaj iel la 100 jariĝo de la Montreala E-Klubo. Pro la pasintjara sukceso ni decidis samfari en decembro 2003. Nova nomo, nova programo por „nova ĉeestantaro”. Kial tio? Nu, ni rimarkis ke niaj Z-festoj allogis nur la verdecajn Esperantistojn. Se la movado volas malfermi sin al la ekstera mondo, ni ne devas tro „Zamenhof-festi”. Tiel estas dum Z-festo, legi pri la vivo de Z., legi poemon verkitan de Z, ktp. Por novuloj en la movado kaj kunuloj de Esperantistoj tio estas iom iel „sekteca”. Do, nun ni bonvenigas ĉiujn por „decembra festo”. Komence estas granda komuna bufedo kun babilado en diversaj lingvoj. La celo estas organizi feston kun amikeca etoso por ĉiuj, ne „pureca” E-vespero. Poste okazis publika prezento de la novtradukita libro *Nanatisis*. La Kebeka aŭtoro s-ro Robert Dutil ĉeestis kaj rakontis kial li verkis tiun ĉi pacecan libron. Sekve Zdravka Metz parolis pri la tradukado kaj Karlina kaj Saŝa laŭtlegis fragmenton de la verko. Anoncis sin poste Mateo McLauchlin, kiu legis *Kiam mi aŭdis je la tagfino* de Walt Whitman. Helpe de kasedo de Nikolin, *Jula Land'*, ni kunkantis ses kristnaskajn kantojn. Daniela Bédard deklamis la *Cikado kaj la formiko* de Jean de la Fontaine kaj bele kantis infankanton. Poste estis pli da babilado. La vespero okazis plejparte en E. sed ni lasis tempon por tradukado france. Ja

ĉeestis 31 personoj (4 el Kebeko, 3 el Otavo) tiel estas 20 esperantistoj, 7 komencantoj aŭ amikoj kaj 4 infanoj. Ni fieras pri la sukceso ĉar ni atingis nian celon, malfermis la feston al pli granda rondo. „En la mondon venis nova sento.”

— Normand Fleury, Montrealo

P.S. La festo okazis en kunveno ĉe la Montreala Botanika Ĝardeno. Vi estas bonvenaj en 2004 ĉeesti. Eventuale vidu ĉe: <www.esperanto.qc.ca>


AMASKOMUNIKILA AGADO IMPONA

En Kanado, aperis impona artikolo en *La Presse* en Montrealo pri la UK (29an de julio); oni intervjuis Normandon Fleury kaj Martin Haase, germanan Esperantiston, kiu ĉeestis tiumomente alian kongreson en Montrealo. Aperis artikolo en *The Citizen* (Otavo) je la 31a de januaro 2004; ĵurnalistino intervjuis plurajn anojn de KEA, ne nur en Otavo, por verki. Tiu artikolo troviĝas en la reto ĉe: <http://www.canada.com/ottawa/ottawacitizen/news/story.html?id=71c6bed3-75db-4184-b335-e3fff6c6c2bf>. *The Calgary Herald* je la 23a de julio aperigis artikolon pri la ĉeesto de Allan kaj Meredith Simon ĉe la UK en Gotenburgo. Estas klare, ke oni devas profiti de la ĉeesto de kanadanoj ĉe la UK: la kongreso atentigas ĵurnalistojn pri la lingvo, kaj la Brusela Komunikad-Centro lerte kunordigas la pretigon de anoncoj por amaskomunikiloj. Bruce Arthur bonkore sendis la jenan raporton pri CBC elsendo: En julio, estis intervjuo pri Esperanto je Radio CBC (Radio 1). Intervjuiĝis Mark Fettes, kiu estas KEAano de Vankuvero kaj la direktoro de la Esperantic Studies Foundation. La intervjuo, kiu daŭris kelkajn minutojn, aŭdiĝis trans Kanado je la matena serio *Sounds like Canada*. Mark Fettes bone respondis al pluraj demandoj de la intervjuanto Sheila Coles. Ŝi sciis iom pri la historio de la Esperantomovado, ĉar ŝiaj geavoj estis aktivuloj en la movado. Ŝi kaj Mark Fettes parolis pri la nuna stato de la movado en la mondo. Mark Fettes ankaŭ parolis pri la facileco de la lingvo, kaj deklamis parton de poemo.

Je la internacia nivelo, ne eblas listigi ĉiujn artikolojn, kiuj pritraktas Esperanton, tiom ili abundas. Ĉefe ĉi tiu situacio ŝuldiĝas al la Brusela Komunikad-Centro (BKC), kiun vi rimarkos kiel fonton de pluraj artikoloj en la suba sekcio pri internaciaj novaĵoj. La UK en Gotenburgo stimulis la aperon de multaj artikoloj tra la tuta mondo. Mi notu ĉi tie kelkajn, kiuj povos interesi legantojn de Lumo. En julio aperis longa artikolo en *The Guardian* pri Esperanto: <<http://www.guardian.co.uk/weekend/story/0,3605,995249,00.html>>; ĝin sekvis en aŭgusto egale favora artikolo en la usona magazino *Newsweek*: <<http://lingvo.org/xx/3/440>> pasvorto: saluton). En oktobro, la franca ĵurnalo *Libération* aperigis opinio-artikolon favoran al Esperanto: <<http://www.liberation.fr/page.php?Article=159104>>.

— Geoffrey Greatrex

Bonvenon al Sidney!



Sidney estas bonega loko por ferii. Ĝi troviĝas tuj norden de Victoria, sur la insulo Vancouver – alborde de la urbo Vancouver. Multaj transportaj alternativoj troveblas sur la konferenca retpaĝo – inklusive tra Seattle, Vancouver, aŭ Victoria.

Sidney estas pitoreska apudakva komunumo. Ĝi ofertas butikumadon, restoraciojn, artajn galeriojn, naŭ librovendejojn, parkojn kaj apudbordajn promenojn – ĉirkaŭatajn per belaspektaj oceanaj kaj montaraj vidindaĵoj. Sidney estas plene atingebla por radseĝoj por handikapuloj kaj ekipita kun aŭdeblaj semaforoj ĉefstrate.

Julia vetero estas vere glora, kutime sunplena, ne tro varmega, kaj tre malofte pluva. Venu al la lando de montoj, arbaroj, akvoj, balenoj, agloj, salmo, ĝardenoj, kaj tradicia gastamo.

Metu la daton en vian kalendaron nun!

Rezervigu la hotelĉambron iam ajn – vidu detalojn aliflanke.

Notu la datojn nun kaj registriĝu senprokraste! Vi povas demandi registrilon de ELNA, aŭ elŝutu ĝin de la retpaĝo.

Atentu freŝajn informŝanĝojn, kaj registriĝu por la kongreso perrete se vi volas, pere de la kongresa retpaĝo:

esperanto.org/ELNA/kongreso2004

Se vi ne povos ĉeesti la konferencon, konsideru registriĝon kiel **subtenanto de konferenco**. Subtenantoj ricevos materialojn, ĉiutagajn fotojn kaj resumojn de kongresaj eventoj, kaj publikan rekonon dum renkontiĝoj. Kaj, se poste via partopreno okazos ebla, vi nur pagos la diferencon inter la malalta malfrua kotizo kaj la kotizo de subtenanto, eĉ se la limdato jam pasis. Bonega maniero por subteni ELNA kaj la kongreson!

Invitas vin

**Sidney,
British Columbia
(apud Victoria)**



**16an - 19an de julio, 2004
(de vendredo al lundo)**

**por la rara duobla
kongreso:**

**la 52-a jarkongreso
de ELNA**

kaj la kongreso de KEA

esperanto.org/ELNA/kongreso2004

Esperanto League for North America
www.esperanto-usa.org
(510) 653-0998

Aliĝu por la 52a kongreso en ĉarma Sidney, Brita Kolumbio!

De vendredo vespere, je la 7-a posttagmeze la 16-an de julio – ĝis lundo tagmeze la 19-an de julio, 2004


Tutan tagon vendrede vi estas bonvena al la renkontiĝoj de ELNA estraro (de la 8-a atm ĝis la 5-a ptm) antaŭ ol la ĉefa kongresa programo komenciĝos. Ankaŭ, planu resti plilonge en Sidney por ke avantaĝe ekskursi al lokaj vidindaĵoj lunde posttagmeze. Proponitaj estas *Butchart Gardens*, *Aviada Muzeo de Brita Kolumbio*, *La Mondo de Papilioj*, kaj la pramsipa vojaĝo al *Sidney Spit Marine Park*.

Vi povas pasigi la tutan semajnon, vizitante apudan *Victoria*, *Vancouver* kaj *Seattle*. Vidu la vojaĝturistajn eblojn kaj transportajn alternativojn ĉe la kongresa retpaĝo.

Ĉi-kongreso estas bonega eklanĉa punkto por la *Universala Kongreso en Pekino* (Beijing) kiu komenciĝos sabate, la 24-an de julio.

Bonvolu indiki ĉe la aliĝilo ĉu vi dezirus kontribui al la programo. Pro tio ke ni povos okazigi multajn sesiojn samtempe, ni ja esperas havi plenplenan programon.

La kongresejo



La kongreso okazos en la bela *Mary Winspear Centre*, la nova konferenca/komunuma centro en la urbocentro de *Sidney*. Ĉambroj de diversa grandeco multas en la centro, kaj tio taŭgos perfekte por nia multfaceta programo. Vespera koncerto sabate okazos en la apuda Teatro *Charlie White*, la antaŭscenej-stila konstruaĵo kun 310 komfortaj velurkovritaj seĝoj. Ĉiuj ĉambroj estas facile atingeblaj por handikapuloj.

Loĝado

La kongresa hotelo estas *Victoria Airport Travelodge* en *Sidney*. Ĝi estas tuj trans la strato de la kongresejo. La hotelo estas lastatempe renovigita, kaj enaj trajtoj inkluzivas klimaton, naĝejon kun varmigata akvo, senpagajn en-ĉambrajn kafon kaj teon, harar-sekigilojn, senpagan lokan komunikadon per telefono kaj perfakse, senpagajn tagĵurnalojn, senpagan aŭtoparkadon, kaj la oficejon de *Thrifty Car Rental* en la vestiblo. La plimulto de ĉambroj havas malgrandajn fridujojn kaj mikroondan fornon; se tiuj gravas, petu telefonvokonte.

Kvanto da ĉambroj estas rezervitaj por la kongresanoj speciale malaltkoste ĝis la 1-a de julio: \$115 (kanadaj, proksimume \$80 usonaj) plus impostoj (proks. \$12 usonaj, parte repageblaj por nekanadanoj). Ĉi-prezo estas por la ĉambro kun la litoj *king-size*, *queen-size* aŭ *double*. Ĉi-prezo ankaŭ validos se vi deziras alveni antaŭ kelkaj tagoj, aŭ resti por kelkaj tagoj post la fino.

La prezo estos la sama por maksimume 4 personoj en unu ĉambro. Se vi volas enlistiĝi por trovi samĉambranojn, bonvolu indiki tion en la aliĝilo.

Por rezervi, telefonu 1-866-656-1176 senpage. Menciui ke vi estas parto de la grupo "Esperanto". Se vi havas specialajn preferojn (ĉambron por nefumantoj, specifan etaĝon, ktp.), telefonu laŭeble baldaŭ.

Aliaj hoteloj apude:

Best Western, 1-800-315-3377, ankaŭ tre proksima al la kongresejo.

Sidney Waterfront Hotel and Suites, 1-888-656-1131, proksimume ses stratoj for.

Ankaŭ haveblas aliaj hoteloj kaj *B&B* en la urbeto kaj ĉirkaŭaĵo.

Filatelistoj Serĉataj

47-jaraĝa inĝeniero serĉas Esperantistojn-filatelistojn por reciproka interŝanĝo per poŝtmarkoj. Se vi interesiĝas pri ukrainiaj aŭ sovet-uniaj poŝtmarkoj, skribu al mi: *Vijĉeslav Vasiljev*, P/k 31, UA-91005 Lugansk, UKRAINIO

RECENZEMULOJ KAJ LIBROJ SERĈATAJ

Al mi plaĉus aperigi recenzojn de libroj en aŭ pri Esperanto. Se vi eldonas tian libron, bv. sendi ekzempleron al la redaktoro. Lastatempe la Esperanto-Asocio de Britio (EAB) eldonis novan vortareton, kiu nomiĝas *Mini-D* (angla-Esperanto kaj inverse) kaj oni kontaktis min pri eventualaj recenzoj. Ĉu vi pretus recenzi tian verkon? Se jes, bv. kontakti min. La vortaron verkis *Edmund Grimley Evans*, la prezidanto de EAB. Jen priskribo de ĝi en la angla, kiun preparis EAB: This handy pocket dictionary gives English translations for about 2500 of the most useful words in Esperanto, and Esperanto translations of corresponding words in English, thus providing a basic core vocabulary that is sufficient for everyday use. There is also an overview of the main points of grammar. Ankaŭ eldoniĝis libro en Kanado pri Esperanto en la angla, *Esperanto: A Language for the Global Village*, de *Sylvan Zaft*; ĝin aperigis la eldonejo, *Esperanto Antaŭen en Kalgario*. Ĝin vi povas mendi rekte de *David Yaki* por \$22.95 (sumo, kiu inkluzivas sendokostojn kaj impostojn). Kontakti la eldoniston ĉe <david.yaki@esperanto-antaŭen.com> aŭ ĉe Esperanto Antaŭen, Box 154, Station M, Calgary, Alberta, T2P 2H6. Favoran recenzon de la verko oni aperigis en la revuo *Esperanto* (novembro 2003, p.231).

NE FORGESU REALIĜI AL KEA
POR LA NOVA JARO (KAJ AL UEA
AŬ ALIAJ ESPERANTO-ASOCIOJ)

Por realiĝi al KEA, sendu ĉekon por \$20
al KEA, P.O. Box 2159, Sidney (BC),
Kanado V8L 3S6

ESPERANTOMOBILLO: POR ESPERANTO EN NORDA AMERIKO!

Ĉi-somere en Norda Ameriko komenciĝos nova varbada kaj instrua kampanjo, kies celo estas informi pri Esperanto kaj instrui ĝin en multaj urboj sur la kontinento. La kampanjo malsamos al aliaj ĉar ĝi estos konstante moviĝanta de urbo al urbo. „Sed kiel tio efektiviĝos?“, eble demandas vi. Nu, la teamo, kiu konsistos el tri geamerikanoj kaj tri gerusoj, veturos en veturilo nomata „Esperantomobilo“ kaj gvidos semajnfinajn intensivajn Esperanto-kursojn por novuloj kaj progresantoj en ĉiu vizitata urbo.

„Kaj kial oni faru tian frenezaĵon?“, povus esti via sekva demando. Kiel vi scias, en Norda Ameriko esperantistoj tro ofte estas izolitaj unu de la alia, do ne ekzistas fortaj kluboj kiuj okupiĝas pri ekstera informado, varbado kaj gvidado de diversnivelaĵoj kursoj. Ankaŭ, multaj homoj ne konscias pri la tutmonda lingva problemo. Tiuj, kiuj iam aŭdis pri Esperanto, kredas ĝin aŭ jam delonge mortinta aŭ tute nefunkcianta lingvo. Tial gravas montri al homoj ke Esperanto estas viva kaj efika. Ĝi solvas problemojn de internacia komunikado kaj bone funkcias en la nuna tutmondiĝa epoko. Per nia ekzemplo ni volas montri ke ĝi taŭgas ne nur por ebligi interkompreniĝon inter amerikanoj kaj rusoj, sed ke ĝi povas ankaŭ pliriĉigi kaj pliinteresiĝi niajn vivojn, doni al ni la plej nekredablajn eblecojn kaj spertojn. Se tio, kion mi rakontis, konvinkis vin pri la neceso de

tia projekto, vi eble scivolas nun, kiel vi povus helpi realigi ĝin. Nu, ekzistas pluraj eblecoj. Ekzemple, tre gravas disvastigi informojn pri la projekto! Do se vi rakontos al viaj amikoj, klubanoj, samklasanoj, kolegoj - tio jam helpos al ni! Ankaŭ, vi povas inviti nin al via urbo por gvidi niajn kursojn ĉe via universitato, preĝejo, biblioteko aŭ lernejo. Vi simple devos aranĝi lokon kie ni povos instrui, kontakti la lokan gazetaron kaj reklami la okazantaj kursojn. Kaj se vi sukcesos trovi por ni loĝejon kaj organizi manĝadon, ni tre dankus!

Ni ankaŭ bezonas monon por komenci kaj daŭrigi la projekton. Ni jam havas sufiĉe da rimedojn por la tri unuaj monatoj, sed ni tute ne ŝatus fermi la projekton post tiom mallonga tempo! Do se vi volas iĝi parto de la projekto, dediĉante al ĝi iom da mono, tio estus grava kontribuo al Esperantomobilo, kaj ni esprimos nian dankemon al vi persone en nia ttt-ejo ĉe: <http://www.esperantomobilo.org> (nun alirebla en kvar lingvoj).

Kaj se vi havas aliajn proponojn pri kiel vi povas helpi aŭ eĉ partopreni en la projekton - ne hezitu skribi al: ni@esperantomobilo.org. Ni ankaŭ akceptas konsilojn kaj sugestojn por plibonigi nian kampanjon. Dankon pro via eventuala interesiĝo kaj ĝis la revido - espereble en via hejmurbo!

— Oleg Izjumenko ni@esperantomobilo.org

Artikoloj

KANADAJ LINGVO-KOSTOJ

Antaŭnelonge mi legis ke la registaro de Kanado intencas elspezi pli ol 172 milionoj da dolaroj por indiĝenaj lingvoj. Mia unua penso estis ke tio estas multe da mono. Kial la registaro elspezas tiom da mia mono? Precipe ĉagrenis min, ke la registaro elspezas tiom por tiuj lingvoj, kiam ĝi elspezas neniom por Esperanto. Estas maljuste, ĉu jes? Nu, post pensado, mi decidis ke la afero ne estas tiom simpla.

Unue, la mono estas por dek unu jaroj, ne por unu jaro. Kaj la mono ne nestas por unu lingvo, sed por ĉiuj indiĝenaj lingvoj. Laŭ la artikolo, temas pri pli ol 50 lingvoj. Per simpla kalkulado, mi trovis ke la registaro elspezos malpli ol 313,000 dolaroj por ĉiu lingvo ĉiujare. Post pagi la administrajn kostojn, oni ne povos dungi tre multajn instruistojn.

Sed ĉu ankoraŭ estas maljuste, ke Esperanto ne ricevas similan monon? Tricent miloj da dolaroj certe helpus la buĝeton de KEA, sed mi pensas ke ne malbonas ke Esperanto ne ricevas la monon. Tiel ni povas esti sendependa de la registaro. Kaj eble la popolo havos pli bonan opinion pri nia movado se ni ne prenas monon de impostoj, t.e., se ni ne estas „parazitoj“. Kaj ni devas memori, ke Esperanto estas multe pli facila ol tiuj indiĝenaj lingvoj. Kiam ni instruas la simplan gramatikon de Esperanto, ni kompatu la malfeliĉajn instruistojn de aliaj lingvoj, kiuj devas instrui sian malsimplan gramatikon. Ili meritas monon.

Sed oni povus argumenti ke Esperanto ne povas konkurenci kontraŭ aliaj lingvoj kiam la aliaj ricevas monon de la registaro. Tamen, se oni volas diri tion, oni devas memori ke registaroj en Kanado elspezas milionojn por instrui la anglan, kaj simile por la franca. Kompare al la oficialaj lingvoj, la indiĝenaj lingvoj ricevas tre malmulte.

— Bruce Arthur

MONDAJ PROVERBOJ PRI AKVO (DISKUTITAJ EN LA ĈI-JARA NOREK)

Fluanta akvo respiegulas nenion. Nur per senmova akvo oni vidas. — Taoismo

Oni ne povas regi tro da aferoj samtempe. Kiel kukurboj en akvo, unu suprensaltas, dum vi provas malsupre teni la aliajn. — Ĉinio

La armeo estas la veneno, kaj la popolo estas la akvo, en kiun oni miksas la venenon.

La bubalo, kiu alvenas malfrue, trinkos malpuran akvon kaj manĝos sekan herbon.

— Vjetnamo

Akvo en la buŝo antaŭ manĝi; akvo en la okuloj post vidi la fakturon. — Tibetio

Ĉe festo, iru unue; promenante en akvo, iru poste. Akiri monon similas fosi per kudrilo.

Elspezi ĝin similas al akvo malaperanta en sablon. — Japanio

Kiam la ĉielo plej malhelas, ĝi elverŝas puran akvon. — Afganio
 En malprofunda akvo, salikokoj ridindigas drakojn. — Ĉinio
 El akvo, faru riverojn. El rizo, faru armeojn. — Kamboĝo
 Vortoj estas bobeloj el akvo; agoj estas gutoj el oro. — Tibetio
 Vi ne povas dividi akvon per forko-frapado. — Hindio
 Ĉiom el la akvo fluas en la maron aŭ en la monujojn de la riĉuloj. — Danlando
 Malpuran akvon oni ne povas lavi. — Togolando
 Ĉiu akvofluo havas sian fonton. — Zulua
 Por varti la rozon, oni ankaŭ akvumas la dornojn. — Afriko Se vi laŭdas la viron, kiu deĉerpas la palmarbon, li metos akvon en la palmvinon. — Zanzibaro
 Preni akvon el la sama puto ne garantias ke ĉies saŭco same bone gustas. — Eburbordo
 La koro de saĝa persono kuŝas silente kiel trankvila akvo. — Zulua
 Du akvofaloj ne aŭdas unu la alian. — Kenjo
 La ĉevalo, kiu alvenas frue, havas bonan trinkakvon. — Zulua
 Akvo ĉiam trovas elirejon. — Kamerunio
 Akvo, kiun oni devas almozpeti, ne malsoifigas. — Ugando
 Ajna akvo en dezerto valoras. — Saŭd-Arabio
 Infano sen patrino similas fiŝon en malprofunda akvo. — Birmo
 Kokosa ŝelo da akvo, estas maro al formiko. Fiŝo devas naĝi trifoje: unue en la akvo, due en la saŭco, kaj trie en vino ene de la stomako. — Francio
 Stultuloj kreskas sen akvumado. — Italio
 Fajro, akvo kaj registaro scias nenion pri kompato. — Albanio
 Se marakvo estus pli varma, ni povus kapti boligitajn fiŝojn. — Francio
 Publikaj monprovizoj similas al sankta akvo- ĉiu memservas. — Italio
 Konsili al stultulo similas ĵeti akvon sur anseron. — Danlando
 Nur post sekiĝo de la puto, oni konstatas la valoron de akvo. — Francio
 Oni ne povas ŝanĝi sangon en akvon. — Albanio
 Oni ne forlavas sangon per sango, sed per akvo. — Turkio
 Ne mankas al vi akvo, ĝis la puto sekiĝas. — Irlando
 Mulo scipovas naĝi per sep apartaj teknikoj, sed kiam li vidas la akvon, li forgesas ĉiujn.
 — Armenio

Recenzo de Socipolitikaj Aspektoj de la Esperanto-Movado

Ĉi-somere mi aĉetis de la Libroservo libron kun titolo Socipolitikaj Aspektoj de Esperanto-Movado. Ĉi tiu libro estas kolekto de 10 artikoloj de ses verkistoj. Ŝajnas ke ĉiuj verkistoj estas profesiaj historiistoj aŭ lingvistoj de orienta Eŭropo aŭ Sovetunio. Plimulto de la artikoloj temas pri historio aŭ pri ideoj. Pro tio, tute ne estas problemo ke la artikoloj estas malnovaj, de la 1970-aj jaroj aŭ pli frue. Kiel mi indikis, plimultaj artikoloj temas pri historio. En ĉi tiuj, ĉiuj temas pri la historio de la Esperanto-movado en Eŭropo. Estas artikolo pri d-ro Ludoviko Zamenhof kaj liaj ideoj; alia montras la similecon de la movado por Volapüük kaj la frua movado por Esperanto. Post 1900, multaj laboristoj lernis Esperanton kaj komencis uzi ĝin por siaj politikaj celoj. Artikolo priskribas kiel ili, post la unua mondmilito, fondis la Sennaciecan Asocion Tutmondan, kaj pliposte membroj foriris por fondi alian asocion, la Internacion de Proleta Esperantistaro. Alia artikolo priskribas la amikajn kontaktojn inter societoj de laboristaj Esperantistoj en Germanio kaj Esperantistoj en Sovetunio. Ankaŭ estas artikolo, kiu studas la demandon, „Kion dirus V.I. Lenin pri Esperanto?” La respondo estas: verŝajne nenion! Sed la verkisto ankoraŭ sukcesis verki interesan

artikolon. La plej lastatempa historia artikolo konsideras la nazian registaron. Ĝi priskribas kiel la naziistoj traktis la Esperanto-movadon, kaj kiel reagis la Esperantistoj.

La libro ankaŭ enhavas artikolon, kiu argumentas ke Esperanto ne havas „internan ideon”. Alia artikolo donas opiniojn pri la kondiĉoj kaj strategioj, kiuj estas necesaj por sukcesigi Esperanton. La libro eldoniĝis en Hungario en 1986, kiam tiu lando ankaŭ havis komunisman registaron. Oni eble supozus ke libro pri politikoj devus havi komunismajn ideojn. Ja oni povas legi multajn opiniojn de Marksismo-leninismo en la libro, sed la artikoloj ankaŭ havas multege da faktoj pri la Esperanto-movado. Legantoj, kiuj ne interesiĝas pri Marksismo povas libere legi faktojn kaj malatenti la opiniojn. Entute, mi trovis la libron interesa kaj informo-plena.

— Bruce Arthur

La katalogo de KEA de 2004 jam disponeblas dank' al Normando Fleury. Petu ekzempleron de la Libroservo de KEA, 6358 rue de Bordeau, Montréal, Québec, H2G 2R8,

<esperanto@sympatico.ca>

Internaciaj novaĵoj

UNUIĜINTAJ NACIOJ:

REZOLUCIO DE LA ĜENERALA ASEMBLEO PRI MULTLINGVECO

Konsulteblas ekde nun la rezolucio de la ĝenerala asembleo de Unuiĝintaj Nacioj pri multlingveco en pluraj lingvaj versioj en la reto. La rezolucio, datita de aprilo 2002, mencias „multlingvecon kiel rimedon por favori, defendi kaj protekti la diversecon de lingvoj kaj kulturoj mondnivele,” ke „la vera multlingveco favoras la unuecon en diverseco kaj internacia interkompreno”.

Dum la baldaŭa 58a sesio de UN la Ĝenerala Sekretario prezentos ĝeneralan raporton pri la apliko de ĝiaj rezolucioj rilataj al multlingveco. Kiom proksima la rezolucio ankaŭ al esperantistaj celoj manifestiĝas en alia punkto de la rezolucio, kiu jenas: „Ĝojas ke la Ĝenerala Asembleo de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj pri edukado, scienco kaj kulturo decidis la 17-an de novembro 1999, proklami la tagon de 21-a de februaro *Internacia Tago de la gepatra lingvo*”, kaj petas Membroŝtatojn kaj la Sekretariaton ke ili kuraĝigu la prezervon kaj defendon de ĉiuj lingvoj parolataj en la tuta mondo.” UEA kunagis tiu ĉi kampe per deklaro kaj kontaktado al naciaj UN-agentejoj. Vd. por tio la deklaron ĉe: <http://lingvo.org/xx/3/239>. Konsultu ankaŭ <http://www.lingvo.org/xx/3/306>. Ni ĝis nun posedas 10 lingvoversiojn de la rezolucio, se vi emas traduki vialingven, bv. kontakti: marko.lins@lingvo.org

— Marko Naoki LINS (BKC)

INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO ENDANĜERIGITA

„En la statistika vetkurado de la kvar specialaj datenbankoj de la Austria Nacia biblioteko Trovanto devas digesti etapan malvenkon. En junio ĝi fariĝis la lasta,” agnoskas la biblioteko-respondeculoj Christian Cimpa, Helga Farukuoye kaj Herbert Mayer. Antaŭ la plej grava Esperanto-biblioteko estas aliaj sekcioj de Aŭstria Nacia Biblioteko nome Tabulae (824), Nak (812), Ariadne (699). Trovanton oni konsultis dum la monato junio nur 562-foje. „Tamen ni optimismas, ĉar certe - kun via helpo - ni preterpasos venontfoje la aliajn.”

En sia pli ol 70-jara ekzisto la biblioteko de la Internacia Esperanto-Muzeo (IEM) en Vieno daŭre ampleksiĝis kaj estas hodiaŭ la plej granda kolektaĵo pri Esperanto kaj interlingvistiko. Ĝi ankaŭ travivis la plej teruran periodon por Esperanto - la hitlerismon. Fondita en 1927, de Hugo Steiner, la kolekto por planlingvoj fariĝis parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko en 1929. Pro spacbezono la tuta muzeo denove translokiĝis en 1930 el ĉeval-stalo kaj monak-ĉelo en la imperia palaco rekte en grandan salonegon de la Hofburg. La enmarŝo de Hitler en Aŭstrion havis terurajn konsekvencojn por IEM. Esperanto iĝis malpermesita lingvo. Post trimonata aresto IEM-fondinto Hugo Steiner liberiĝis kaj ĝustatempe sukcesis persvadi la koncernajn instancojn ne detrui la materialon de IEM, sed nur forpaki kaj meti ĝin en kelon. Speciale kruelan sorton suferis unu el la laborantoj en IEM: Gustav Weber estis mortturmentita en koncentrejo kelkajn tagojn antaŭ la liberigo de Aŭstrio en 1945.

Hodiaŭ la Internacia Esperanto-Muzeo posedas 25,000 volumojn, 2000 muzeajn objektojn, 2000 aŭtografajn kaj manuskriptajn, 13.000 fotojn, 1100 afiŝojn kaj 40,000

flugfoliojn. Ili plejparte estas interrete konsulteblaj dank' al la programo Trovanto. „Planlingvoj estas grava elemento kadre de la lingva kreivo de homoj. Ilin priskribas tiu sciencobranĉo, kiun ekde la unua duono de la 20-a jarcento oni nomas interlingvistiko. Post unuaj provoj mezepokaj nur ekde la 16-a jarcento aperas la unuaj ellaboritaj planlingvoj. Ilia celo estis roli kiel instrumento de logika kaj filozofia pensado. Multaj gravaj personoj de la Eŭropa intelektularo okupiĝis pri la temo, i.a. Francis Bacon, Jan A. Komensky, alinome Comenius, René Descartes kaj Gottfried W. Leibniz.” „IEM rolas kiel muzeo, biblioteko, arkivejo kaj estas la plej granda lingvistika libraro pri planlingvoj,” klarigas la respondeculoj Christian Cimpa, Helga Farukuoye kaj Herbert Mayer. „Fakte tro malmultaj homoj uzas nian datenbankon kaj se ni ne depost jaroj estus petintaj ofte la gesamideanojn enrigardi, ĝi ne plu ekzistus,” agnoskas el la biblioteko Helga Farukuoye. „Ekzemple la datenbanko pri la ĉinlingvaj verkoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko ne plu aperas en la statistiko kaj verŝajne ne plu estas prilaborata.” Ŝi faras alvokon al la gesamideanoj: „Se vi ĉiutage rigardas niajn indikojn pri libroj nur dum du minutoj, tio jam estus grava helpo. Se vi eble trovas iun eraron aŭ havas proponon por pli bona ŝlosilvorto aŭ iajn ajn demandojn, bonvolu skribi al mi.”

La instituto kolektas ankaŭ materialojn pri tute nekonvenciaj provoj solvi la lingvoproblemon, ekzemple per revivigo de klasikaj lingvoj. „La modernaj komunikaj teknologioj ofertas ankaŭ al malgrandaj lingvokomunumoj novajn eblojn: la latina fariĝis en interreto denove tute vivoplena lingvo, same kiel ankaŭ la helena, kiu neniam ĉesis roli kiel literatura lingvo tra la jarmiloj.”

Legu pli pri la biblioteko:

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/index.htm> aŭ

<http://tinyurl.com/fxkj>.

Konsultu la datenbankon Trovanto:

<http://allegro.onb.ac.at/cgi-bin/allegro/maske.pl?db=esperanto&lang=esp> aŭ

<http://tinyurl.com/fxff>

— BKC

UEA AGADO ESPERO-LERNEJOJ POR EVOLUO



Oni invitas al samideanoj helpi la lernejon de la esperantisto François Hounsounou en Aguidahoue, en kiu oni instruas ĉion instruendan laŭ la nacia programo kaj Esperanton aŭ per mono (sendu al la Fondaĵo Espero de UEA kun la indiko „lernejoj por evoluo”) aŭ per skribiloj kaj kajeroj sendendaj rekte al: François Hounsounou, BP 226 LOKOSSA-MONO, BENIN.

Al Lingva Demokratio!

ALVOKO AL LA ESPERANTISTARO (KAJ APARTE AL LA MEMBROJ DE UEA/TEJO/ILEI)

Karaj membroj (kaj ne-membroj), La Komitato de UEA dum la ĵus pasinta Universala Kongreso en Gotenburgo taksis pozitivaj la atingojn sur la kampo de la labor-plano dum la pasintaj jaroj kaj aprobis aktualigon de ĝi por la jaroj 2003-2005. Ni nun ree alvokas, por ke oni laboru laŭ la antaŭviditaj prioritatoj ankaŭ en la komenciĝanta labor-jaro.

La labor-plano emfazas la jenajn prioritatojn:

- ★ informado
- ★ instruado
- ★ utiligado

kiuj estu atingataj kune kun:

- ★ plijuniĝo
- ★ tutmondiĝo
- ★ profesiiĝo.

Ili estas en si mem klaraj, kaj vi povas detale legi en la labor-plano mem, kiel ili estas komprenataj. La teksto de la laborplano estas ricevebla per mesaĝo al <uea@co.uea.org>, per letero al la kutima adreso de UEA aŭ per aliĝo al la listo <labor-plano-de-uea@yahoogroups.com>.

Dum la pasinta jaro multo estis realigata en la kampo de informado kaj papera kaj reta. La kelkaj grandaj artikoloj en internacie gravaj gazetoj, kiuj aperis en la lastaj monatoj, estis sekvataj de amaso da artikoloj en naciaj kaj lokaj gazetoj kunlige kun la kampanjo gvidata de la Brusela Komunikad-Centro okaze de la Universala Kongreso. Samtempe ankaŭ la Internacia Ligo de Esperantista Instruistoj, ILEI, kaj la junulara sekcio de UEA, TEJO, renovigis siajn estrarojn kaj pretas por pliaj laboroj kaj pliaj atingoj en la propraj kampoj. La Komitato de ILEI aprobis tri agadprioritatojn:

- 1 - organiza plifortiĝo,
- 2 - instrukapabligado,
- 3 - la projekto Interkulturo, akorde kun la strategiaj prioritatoj de la labor-plano de UEA.

Ili realiĝos tra kunlaboro kun TEJO, kiu jam okazas precipe kun ĝia laborgrupo „Esperanto@Interreto”, kaj per plifortigo de kunlaboraj rilatoj kun la landaj sekcioj kaj ĉiuj agantoj en la E-instrua kampo. Ni varme konsilas, ke en ĉiu lando kaj en ĉiu organizaĵo tra la tuta mondo estu almenaŭ unu homo, kiu respondecas pri la realigo de la labor-plano kaj aliĝas al la listo, kie ĝuste oni diskutas pri tio, per malplena mesaĝo al la adreso <labor-plano-de-uea-subscribe@yahoogroups.com> aŭ alimaniere kontaktos nin.

Ni emfazas, ke nia intereso estas laboro kaj kunlaboro por Esperanto. Personaj polemikoj, singravigoj kaj malgravigoj de aliaj esperantistoj neniom utilas por tiu

intereso, sed ni celas ion pli gravan por ĝi: ni volas atingi pli justan rilaton inter kulturoj kaj lingvoj en la mondo, kaj ni disponas konkretan rimedon por tio. Pri tio ni laboras kaj pri tio ni invitas vin labori. Ni faros nian komunan eblon por helpi vin labori laŭ la labor-plano kaj ni dankas vin pro viaj estontaj klopodoj.

— Renato Corsetti, prezidanto de UEA Bertrand Hugon, prezidanto de TEJO, Radojica Petrović, prezidanto de ILEI, Trevor Steele, ĝenerala direktoro de UEA.

PREPARATA LA UNUA OPERDISKO EN ESPERANTO

Jean-Thierry von Büüren, poliglota operkantisto, kiu prezentis tre sukcesan recitalon dum la lasta SAT-kongreso, estas surbendigonta lidojn kaj ariojn en Esperanto, laŭ tradukoj interalie de Mad Mevo kaj de Giorgio Silfer. Rezultos kompakta disko, eldone de LF-koop, kies nuna Trijara Laborpano antaŭvidas ĝuste la unuan KD kun operaj arioj en nia lingvo. Tio aktualigos tradicion, kiu ekis per *Halka* komence de la pasinta jarcento, kaj vidis en 1931 la unuan 78-turnan diskon, en Berlino, kun arioj el *Carmen* kaj *Rigoletto* (ĉi-lasta savita en *Esperanta Songazeto* n-ro 2). Por antaŭmendoj: <lf-koop@esperantio.net>, je la atento de la bendofako. — HeKo

Aboneblecoj

La Ondo de Esperanto estas internacia sendependa magazino en Esperanto. Ĝi aperas ĉiumonate en Kaliningrad (Ruslando).

- ✓ Tra Esperantujo: Informoj, komentarioj, intervjuoj
- ✓ Esperanto: Lingvo, movado, kulturo
- ✓ Civilizo: Kia estis, estas kaj estos nia mondo
- ✓ Beletro: Noveloj kaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj
- ✓ Vide el Bruselo: Diversaj aspektoj de la Eŭropa unuiĝo
- ✓ Vortoj de Komitatano Z: Kritikaj notoj de kompetentulo
- ✓ Mozaiko: Krucvortenigmoj, konkursoj, kvizoj, humuro
- ✓ Senpaga literatura suplemento jarfine

Ĉiujare: La Esperantisto de la Jaro, Internacia Fotokonkurso, Literatura konkurso „Liro”. Nur 34 dolaroj jare, ĉekoj pageblaj al Geoffrey Greatrex. Abonu ĉe Geoffrey Greatrex (adreso, p.4).

Ni volonte presos aliajn informojn pri aliaj revuoj, kiuj mendeblas en Kanado pere de aliaj homoj. Bv. sendi al redaktoro la informojn.

Por konfirmi vian solvon de la lasta krucvorttenigmo:

A	F	T		A	L	E	G	R		P	A	R	A	N
K	R	E		P	U	D	R	U		E	V	O	L	U
S	U	R	P	R	I	Z	I	S		R	O	B	O	N
O	K	U	L	O		P	I	S	T					
	T	R	I	B	U	T		O	K	U	P	A	S	
				A	N	I	M		I	R	O	N	I	A
P	R	O	K	S	I	M	A	N		B	R	A	N	Ĉ
	R			K	A	R	O	T		S				
D	O	G	A	N		S	O	M	E	R	D	O	M	O
O	R	I	G	O	S		N	A	N	O				
	F	O	R	M	A	S		S	U	M	I	G	U	
				O	P	A	L			A	R	A	N	E
P	A	C	A	N		B	U	T	O	N		M	I	S
A	P	A	R	T		A	P	E	L	O		B	O	T
F	I	R	M	A		T	E	R	E	N		O	N	I

Refoje dank' al Don Reble

Kaj nun, NOVA KRUCVORTENIGMO por defii (amuzi, turmenti, frenezigi) vin:

- | | | | |
|---------------------------------|--------------------------------|---------------------------|--------------------------------------|
| <u>transen</u> (r = radiko) | 19 plej malgranda numeralo | 35 sciigilo sur muro (r) | 48 portilo prenilo, tirilo, ktp. (r) |
| 2 dis(igit)a parto (r) | 20 elparoli | 37 ne pli ol | 49 plenumontan de ies volo |
| 7 vorto iam skribita sen vokalo | 21 praa fabelo (r) | 38 altiri per plaĉeco (r) | 52 iom rapida kuro (r) |
| 9 kondiĉe ke | 22 faka vortaro | 40 korodita fero | 53 kavo por akvo (r) |
| 10 granda de tereno (r) | 24 kava globo (r) | 42 kunmartelanta ladojn | 54 kiel fil(in)o |
| 11 aparato | 26 tenilon | 46 tiu loko | 55 plejsanktulo |
| 13 jukiga insekto (r) | 28 plato de metalo (r) | 47 korpero | 56 ne nur tio, sed plie |
| 14 danckunveno | 30 aŭreolo (r) | | 57 eksteriga prepozicio |
| 16 sorbonta koloraĵo | 34 manĝaĵo el faruno kaj lakto | | 58 dorsosako (r) |

1									2		3		4	5	6	
7	8							9						10		
11		12						13				14	15			
16				17	18							19				
				20								21				
22								23		24					25	
								26		27					28	29
30	31	32	33					34						35		36
		37						38				39				
				40		41					42		43	44	45	
						46						47				
																51
						48					49	50				
															54	
						52										
											56					57
58																

suben

- | | | | |
|--------------------------------|-----------------------------------|----------------------------|-----------------------------|
| 1 malekvilibriĝan, kiel glacio | 12 leviĝanta kaj refalanta akvo | 27 hepatsekrecio (r) | 43 infuzaĵo de aziaj folioj |
| 2 bestaŭto | 13 manĝebligi nutraĵojn | 29 radikalo de 55-trans | 44 arbo kia betulo (r) |
| 3 semnutraĵo (r) | 15 glicirizgusta grajnoj | 31 malvira (r) | 45 skribi en kajeron |
| 4 produkanta domaĝon | 17 liptŭsi (r) | 32 vertikala masonaĵo (r) | 49 muzika teatraĵo (r) |
| 5 eta parto | 18 de unu ekstremo ĝis alia | 33 kolekton da paŝtobestoj | 50 amase mortigi (r) |
| 6 maljes | 23 patrfrato | 36 grenadfragmentoj | 51 daŭre |
| 8 dua el du (r) | 24 sonon el buŝo | 38 subjure diris | 52 movi ion al si (r) |
| 9 tuj plialta ol | 25 infuzaĵo de Arabaj grajnoj (r) | 39 biletfenestreto (r) | 55 insistanta konjunkcio |

Dank' al Don Rebel

